# *Fini?as laborsesioj de interregistara komisiono Kubo-Rusio*



Havano, apr 1 (RHK) La bezono tutmondigi solidarecon kaj internacian kunlaboron, estis ratifita dum la sesio de la 18-a interregistara komisiono Kubo-Rusio por kunlaboro komerca-ekonomia kaj sciec-tenika, kiu fini?as hodia?.

La sesiojn prezidis la kunprezidantoj Ricardo Cabrisas Ruiz, vicunua ministro de Kubo, kaj Yuri Ivanovich Borisov, vicprezidanto de la rusa federacio.

Cabrisas konsideris ke la renkonti?o esprimas la tradiciajn amikajn rilatojn inter amba? landoj, dum Borisov priskribis Kubon kiel kerna kaj strategia partnero por sia lando; aldonis ke la rilatoj estas bazitaj

sur respekto, fido kaj travideblo, kio markas la historian ligon inter amba? landoj.

Dum la kunsido oni revuis aferojn de komuna intereso en la bran?oj ekonomia, financa, energetika, transporta, agrikultura, pri komunikoj kaj sano, interalie.

La kuba vicunua ministro emfazis pri la bezono kunordigi efike la praktikajn agojn de niaj strukturoj por nuligi la efikojn de la politikoj selektivaj kaj unuflankaj aplikataj kontra? niaj landoj.

Estis informite ke nuntempe okazas intertraktoj pri industrio, kunlaboro tekniko-milita kaj oni aparte pritraktas aspektojn financajn de la interago ruso-kuba, la? deklaroj de la kuba vicunua ministro.

Fonto: Granma

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/252626-finigas-laborsesioj-de-interregistara-komisiono-kubo-rusio

RADIO HABANA CUBA

**Radio Habana Cuba**